

Johann Wolfgang von Goethe,

Trovita

tradukita de Antoni Grabowski

Mi foje arbaron
Promene eniris,
Kaj serĉi nenion
En penso deziris.

Mi vidis, en ombro
Jen staras floreto:
Steleto lumanta
Aŭ blu-okuleto.

Mi volis ĝin ŝiri,
Sed plore ĝi diras:
“Ĉu por ke mi velku,
Vi tial min ŝiras?”

Do mi ĝin elfosis
Kun radikareto,
Kaj portis al mia
Ĝarden' ĉe l' dometo.

En loko trankvila
Plantite karese,
Ĝi kreskas, burĝonas,
Kaj floras senĉese.

...

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.